

Quod chorus vatum

Brevier-Himno

Propraj tekstoj laŭ la kalendaro > la 2-an de februaro > Prezento de Jesuo > vespera laŭdo

*Quod chorus vatum venerandus olim
Spiritu Sancto cecinit repletus,
in Dei factum genitrice constat
esse Maria.*

Kion antaŭe plenaj de l' Spirito
kantis profetoj, tio nun okazis
sen ajno dubo en la Di-Patrina,
en vi, Maria.

*Haec Deum caeli Dominumque terrae
virgo concepit peperitque virgo,
atque post partum meruit manere
inviolata.*

Lin, kiu regas teron kaj ĉielon,
virge koncipis vi kaj virge naskis,
ankaŭ post nasko Virgolino restis
vi senmakula.

*Quem senex iustus Simeon in ulnis
in domo sumpsit Domini, gavisus
ob quod optatum proprio videret
lumine Christum.*

Jen, vian filon prenas Simeono
sur siajn brakojn en la dom' de Dio,
kantas pro ĝoj', ĉar Kriston li ekvidis
propra-okule.

*Tu libens votis, petimus, precantum,
regis aeterni genetrix, faveto,
clara quae fundis Geniti benigni
munera lucis.*

Vi, ho Maria, vi, patrin' de l' Reĝo,
al niaj petoj estu vi favora,
verŝu en nin la klarajn lum-donacojn
de l' Dia Filo.

*Christe, qui lumen Patris es superni,
qui Patris nobis reseras profunda,
nos fac aeternae tibi ferre laudes
lucis in aula.*

Krist', Vi la lumo de l' plej alta Patro,
Liajn profundojn Vi al ni malriglas,
faru, ke ni en Lia lumo-halo
ĉiam Vin laŭdu.

Amen.

Amen.

latina T: Hrabanus Maurus (ĉ. 780 - 856)

E: Albrecht Kronenberger 2008